Sur la stratoj de la ĉefaj urboj oni starigas, dum la naŭ tagoj de la Kristnaska Festo (Noche Buena), barakojn kie oni vendas konfitajojn, fruktojn, "piñatas," figuretojn aŭ bombonaĵojn kaj la milojn da aferetoj, kiujn oni aĉetas dum la foiroj.

Ankaŭ je la nokto de la 24a, anstataŭ la germana "arbo" de la Kristnaska Festo, oni kutimas similigi montaron, kie staras la biblia loko Bethlehem, pri kio oni diras, ke Kristo naskiĝis sur la pajlo de besta mangajo. Tie oni metas malgrandajn statuetojn, kiuj reprezentas la Virgulinon kaj Josefon, kaj je meznokto oni metas vaksan aŭ porcelanan infanon senvestan sur la pajlon por reprezentigi la naskiĝon de la filo de Dio.

Ŝafaroj, gardistoj de la samaj dometoj kaj artefaritaj arbetoj kompletigas la pejzaĝon. Tio ĉi estas difinita per la nomo "nacimiento" (naskiĝo).

La "Noche Buena" estas libera nokto, t.e., tiuj, kiuj volas kantadi aŭ ludadi muzikilojn sur la stratoj, povas fari ĝin sen diskutadoj kun la gendarmoj.

Ne estas kutimo fari donacojn al geamikoj

aŭ parencoj je ĉi tiu tempo — nure je la Novjaro — sed la pordistoj, servistoj, jurnalvendistoj, kombistoj kaj veturilistoj, petas sian "bonan nokton."

Kompreneble, la moderna civilizacio penadas iom post iom ŝangadi la popolajn morojn, kaj eĉ tie ĉi en mia lando, ĉiujare oni rimarkas, ke la tradiciaj festoj perdas ion el siaj antikva intenseco, do ne pensu, ke ĉiuj meksikanoj, sen escepto, festas la Kristnaskan tiel same, kiel mi faris la priskribon. Ofte, tre ofte, je la meznokto de la Kristnasko oni dormadas kiel ŝtonoj....

Tamen, ĝi ne estas baro, por deziri al miaj gesamideanoj

FELIĈAN KRISTNASKAN FESTON!

* * * *

Herostratoj kaj Don Kihotoj.

Dufoje mi ĉeestis en Parizo la disputadojn inter Esperantistoj kaj kontraŭuloj, kaj ambaŭ fojojn mi ricevis strangan impreson de tiuj disputadoj.

Al mi ŝajnas strange, ke maturaĝaj, prudentaj kaj seriozaj homoj kunvenis por diskutado pri afero, kiu estas tute klara, kaj ke tiuj ĉi homoj tiel malspareme elspezas sian tempon, por argumenti: unuj — ke duoble du estas kvar kaj la duaj — ke duoble du estas... kandelo!...

Kaj mi rememoras la antikvan frenezan grekon Herostraton, kiu, avidante iamaniere glorigi sin en historio, forbruligis la belegan templon de Diana en Efeso, — kaj poste, antaŭ miaj spiritaj okuloj aperas la Cervantes'a komike-kompatinda figuro de Don Kihoto, kiu, rajdante sur sia maljuna lama Rosinanto, tiel energie kaj kurage bataladis jen kontraŭ ŝafaro, jen kontraŭ ventmueliloj!...

Ni devas memori la teorion de Darwin pri la deveno de l' homoj: prototipoj de niaj geavoj, ĝis nun ankoraŭ logantaj en tropikaj arbaroj, estas treege imitemaj, — kaj ni perfekte heredis de niaj kvarmanaj praavoj tiun imitemecon, — kaj iafoge, kiam ni imitas malbonajn ekzemplojn, tiu ĉi simia eco estas tre malutila ne sole por ni mem, sed ankaŭ por la ideo, kiun ni predikas, por la afero, kiu ni entreprenas. Imagu, ke ĉiuj niaj gesamideanoj, proimitado, ankaŭ Don Kihotigos kaj komencos bataladi kontraŭ ventmueliloj?... Tiaokaze la tuta mondo similiĝos al grandega frenezulejo, kaj finfine, anstataŭ plena venko de l' ideo de Esperantismo, ni revenos al la antikva sovaĝa stato de niaj kvarmanaj praavoj... La vereco de l' Darwin'a teorio, certe, tiamaniere estus evidente pruvita, sed mi ne kredas, ke la homaro estos feliĉa pro tia malprogresso!...

Memoru, sinjoroj gramatikistoj, ke Esperanto

apartenas nun ne al vi, sed al la popolo, kiu bezonas ĝin pli multe, ol vi, kiu jam delonge uzas ĝin praktike en sia ĉiutaga vivo, kaj kiu tute ne komprenas kaj eĉ ne deziras kompreni viajn skolastikajn esploradojn pri diversaj gramatikaj subtilaĵoj, malsimpligantaj kaj malklarigantaj tiun Esperanton, kiun ni ricevis el la manoj de nia Majstro. Por Esperanta popolo estas tute indiferente, ĉu la nuna Esperanto estas absolute perfekta, aŭ ne, — kaj via skolastiko, nenion pruvonte kaj neniu konvinkante, nur malhelpas al la natura evoluo de nia kara lingvo kaj malakcelas ĝian progreson kaj disvastiĝadon.

Do, lasu, karaj gesamideanoj, niajn modernajn Herostratojn provi akiri sian gloron, ne atentu ilin, — kredu, ke tio estas la plej bona rimedo devigi ilin malaperi same nerimarkable, kiel ili aperis, — sed vi mem... forbruligu viajn kartonajn glavojn, donacu viajn lamajn Rosinantojn — skolastikajn esplorojn — al senfeligistoj kaj, anstataŭ bataladi kontraŭ ventmueliloj, revenu al via fruktoporta laborado pro nia sankta ideo...

Vivu Esperanto kaj ĝiaj veraj kaj fidelaj adepto!

El *La Movado*.

V. DEVJATNIN.

* * * *

La Kvinpinta Stelo antaŭ Dumil Kvarcent Jaroj.

Ofte oni aŭdas la diron, ke en la mondo troviĝas nenio nova kaj, rilate al la kvinpinta esperanta stelo, oni certe devas konsenti, ke tiu ĉi aserto estas prava, ĉar laŭ la formo nia stelo baziĝas sur simetria geometria figuro, kiun oni jam konis en tre antikvaj tempoj.

Se oni prenas en la cirkonferenco de cirklo kvin punktojn je la sama distanco unu de la alia, kaj se oni kunigas ĉi tiujn kvin punktojn per rektaj linioj, ne ĉiun kun la du najbaraj punktoj, el kio rezultus nur ordinara regula kvinangulo, sed ĉiun punkton kun la du kontraŭaj punktoj, oni ricevas regulan kvinpinton figuron, kiun oni nomas en la geometrio: la *reeniranta aŭ stelforma kvinangulo*.

Tiu ĉi figuro estas la bazo de nia kvinpinta stelo, kiu diferencas de ĝi nur per la foresto de la mezaj partoj de la kvin rektaj linioj, kiuj kuŝas interne de la figuro. Sed laŭ ĉiuj aliaj rilatoj la esperanta stelo devas havi ekzakte la saman formon kiel la stelforma kvinangulo, kaj ĝi estas ĝuste kaj bele desegnita nur tiam, kiam ĝiaj pintoj estas nek pli akraj nek pli malakraj ol tiuj de la stelforma kvinangulo. Por decidi, ĉu kvinpinta stelo estas bone desegnita aŭ ne, sufiĉas do konстатi ĉu la kvin pintoj kuŝas je la sama distanco unu de la alia, kaj ĉu

la dek streketoj, kiuj formas la stelon, trövigas po du en sama rekta linio.

Laŭ la sama metodo, kiu donas al ni la stel-forman kvinangulon, oni povas ankaŭ konstrui tutan serion da aliaj similaj stel-formaj figuroj kun pli ol kvin pintoj, kaj se oni deseignas la plej simplajn el tiuj ĉi figuroj kun kvin, sep, ok kaj naŭ pintoj, oni facile konvinkigas, ke la stel-forma kvinangulo superas ĉiujn aliajn per sia simpleco kaj beleco. En la geometrio oni nomas tiujn ĉi figurojn: *reenirantaj* aŭ *stel-formaj multanguloj*, sed ili havas nenian gravecon laŭ la scienco vidpunkto kaj preskaŭ nur estas ludajo. La geometriaj verkoj do plejparte silentas pri ili kaj nur malmultaj personoj scias, ke ili ekzistas.

La fama greka filozofo Pitagoro, kiu vivis dum la sesa jarcento antaŭ Jesuo Kristo, estis la unua, kiu studis kaj priscribis tiujn ĉi figurojn. Pitagoro ankaŭ estis tiu, kiu unue instruis, ke nia tero ne estas ebenaĵo sed estas globo, kiu naĝas sen subteno en la spaco. Li kaj liaj disciploj aŭ lernantoj fondis duonreligian sekton kaj kredis je la metempsikozo aŭ transmigrado de la homaj animoj tra la korpoj de bestoj. Ĉar ili opinias, ke la bestoj estas estajoj similaj al ni mem, la pitagoranoj mal-satis ilian buĉadon kaj mangadon, kaj pro tio ili ĉiuj estis vegetaranoj.

Laŭ la pitagoranoj la stel-forma kvinangulo estis la simbolo de la sano, kaj ili atribuis al ĝi mistikajn ecojn. Multajn jarojn poste dum la mezepokaj jarcentoj la sama figuro denove troviĝas kaj ludas gravan rolon en la astrologio, la alhemio kaj la magiaj artoj, kaj eĉ nun, se mi ne eraras, ĝi havas ian specialan signifon por la spiritistoj kaj la modernaj okultistoj.

Sed la pitagoranoj ankaŭ faris pli indan uzon de la stel-forma kvinangulo; ili utiligis ĝin kiel signo, per kiu ili povis rekonii unu la alian. Precizaj detaloj pri tiu ĉi uzo de la kvinpinta stelo mankas al ni, ĉar bedaŭrinde nek Pitagoro nek liaj disciploj postlasis iajn literaturajn verkojn, kaj ni nur scias pri ili laŭ la rakontoj de aliaj aŭtoroj, kiuj vivis kelkajn jarcentojn

poste. Tamen la jena anekdoto, kiun rakontas la greka verkisto Iamblichus, donas al ni ian ideojn pri la utilaco de la kvinpinta stelo kiel rekonilo inter la pitagoranoj.

Iam okazis, ke vojaĝanta pitagorano grave malsanigis en vilaga gastejo, kie li haltis dum-nokte. Kvankam li estis nur malriĉa studento, la gastejisto, kiu estis bonkorulo, zorge flegis lin kaj ŝparis nek laboron nek elspezojn por resanigi lin kaj malgrandigi liajn suferojn. Tamen, malgraŭ ĉiuj klopodoj, la malsano de la studento pligravigis. Fine, sentante, ke li mortas, kaj trovante sin sen mono por rekomenci la gastejiston, la studento petis, ke oni donu al li lignan tabuleton. Kiam li ricevis ĝin, li deseignis sur ĝi kvinpinton stelon kaj redonis ĝin al la gastejisto kun la peto, ke li pendigu ĝin ekster sia gastejo tiamaniere, ke ĉiuj preterpasantoj povos facile ekvidi ĝin. Samtempe li certigis la gastejiston, ke tio alportos al li rekompencon pro lia bonfarado. Baldaŭ poste la studento mortis, kaj la gastejisto konvene enterigis lin kaj elpendigis la tabuleton ekster sia gastejo.

Post kelkaj jaroj vojaĝanto rajdante iun tagon preter la gastejo rimarkis la sanktan signon. Li tuj haltis, elseligis kaj eniris la gastejon por demandi klarigojn pri la deveno de la

signo, kaj kiam oni rakontis al li ĉion, kio okazis, la vojaĝanto, kiu kompreneble ankaŭ estis pitagorano, malavare rekompencis la bonkoran gastejiston.

Vere tiu ĉi rakonto montras al ni, ke ekzistas nenio nova sub la suno, ĉar ni trovas en ĝi ne nur la saman uzon de la kvinpinta stelo kiel rekonilo kiel nun, sed ankaŭ ion, kio tre similas al la nova — aŭ, ĉu ni ne devus diri — la malnova sento.

MAX SULTZBERGER

(Laŭ *Mathematical Recreations and Essays*, de W. W. Rouse Ball).


— Kiu estas via plej bona amiko? — demandis iu al malgranda knabo.

— Tiu, kiu konas min kaj, malgraŭ tio, amas min.

Kvinpinta Stelo.



Stel-formaj Multanguloj de Pitagoro.



Learners' Corner.

The following is a suggestion for first lessons to English children (or to adults who learn with difficulty), to be used as an introduction to *Esperanto for Young Beginners*. It aims at affording practice in some of the commoner elements of speech, by means of roots already familiar. The beginner thus gains confidence in speaking the new language, and is ready to learn less familiar things.

Each sentence here given is a model, in imitation of which the learner should himself form a whole group of similar sentences with the help of other suitable words (lists of which I will send to anyone on receipt of stamped addressed envelope).

The first paragraph is given more fully, to show the idea.

Banano (melono, olivo, orangô, figo) **estas frukto**. Elefanto (gorilo, gîrafo, hundo, kato) **estas besto**. Karpo (sarko) **estas fiô**. Najtingalo (koko, kanario, vulturo) **estas birdo**. Ameriko (Irlando, Aûstrio) **estas lando**. Rozo (lilio, tulipo) **estas floro**. Piano (harpo, fluto) **estas instrumento**. Inko (limonado, rivero, supo) **estas fluido**. Granito (stono) **estas mineralo**.

Piano **ne estas fiô**, piano **estas...**

Cu benzino **estas fluido**? **Jes**, b. **estas f.**

Cu zinko **estas gaso**? **Ne**, z. **ne estas gaso**; **gi estas solido**.

Cu **gi estas metalo**?

Banano **kaj** melono **estas fruktoj**. Cu rozo **kaj** tulipo **estas fruktoj**? **Ne**, **ili estas...** Pianoj, harpoj **kaj** flutoj **estas instrumentoj**.

La princo **estas poeto**. **La** profeto **estas patrioto**.

Cu **la sekretario** **estas Germano**? **Jes**, **li estas**. Cu **la instruisto** **estas doktoro**? **Ne**, **li ne estas**.

Cu **li ne estas doktoro**?

Mi **estas anglo** (polo, franco).

Cu **vi** **estas ruso**?

Se **vi** **estas anglo**, **kaj mi** **estas anglo**, **ni** **estas angloj**. **Vi kaj li kaj mi** **estas...**

Si **estas inteligenta**.

La afero **estas interesa**, **gi** **estas tre interesa**. Cu **vi ne** **estas riĉa**? **Mi** **estas malriĉa**, **tre malriĉa**.

La krimo **estas nenecesa**, **kaj la motivo** **malnobla**. **La ideo** **estas ĉarma**, **sed** **malpraktika**. **La laboro** **estas malagrabla**, **sed la profito** **estas certa**, **kaj la rezultato** **perfekta**.

Jozefo (Paûlo, Klemento, Georgo) **estas ...a**, **sed Josefino** (k.t.p.) **estas mal...a**. Elefant-, karp-, kok-, princ-, rus-, angel- ino.

...a...o.

Tio **estas ...a**. **Tio** **estas ...o**.

Tio **estas ...a**. **Kio** **estas ...o**? Cu **tio** **estas ...o**? ...a...o? ...a...o? ...a...o?

La **...oj** **estas ...aj**. ...aj...oj. (Pr. my boy).

Li (mi, vi) **estas honesta** persono, **honesta ulo**, **honestulo**. Si **estas honestulo**.

Ni **estas ...uloj**. Ni **estas familio** (klubo, grupo, klaso, regimento).

La onklo **estas en la ĝardeno**, sed la onklino **estas en la ĉambro**. Cu ... **estas en ...?**

Kie **vi** **estas**? **li**? **si**? **ili**? **la...**? ... **babilas** **en la klaso**; **en la nesto**. ... **bakas** **en la hotelo**. **La insekto** **dronas** **en la fluido** (inko, rivero).

Kio **estas sur la tablo**? ... **ripozas** **sur la monto**. ... **dormas** **sur la mato**. Kio **estas sur la branĉoj**? Cu... **estas sur la ...**, **au en la ...?**

Ofte; **multe**; **tre ofte**; **tre multe**; **malofte**; **malmulte**.

Helpas (demandas, respondas, similas) **al**.

Fariĝas **blanka**, **blankiĝas**. Fariĝas serioza, serioziga. Fariĝas varma, varm... Fariĝas longa, long...

Bol (prosper, kompre) **-as**, **-is**, **-os**.

Estis, **estos**.

Asert (imag, konfes, memor, pruv, supoz, suspekt) **ke**.

Oni ... **as**.

... **u** **ke**.

... **konsilas**, **ke** ... **silentu**.

Pas (flu, super) **de**.

La kosto **de** **la butero**, korko **de la botelo**, **silento** **de la tombo**, klimato **de Aûstralio**.

La ... **eco** **de**.

Log (simpati) **kun**.

Ces (dezir, forges, konsent, lern, rapid, rifuz, sukces) **as...i**.

... **e**.

Erar (diskut, silent) **pri**.

Mia, **Ha**, **nia**, k.t.p.

Ekzist (serê) **por**.

Bluajo, rond..., kruel...

Fal (trink) **el**.

... **adi**.

Batal (disput, kri, protest) **kontraŭ**.

... **ema**.

The following verbs may be followed by six or more of the nine prepositions already known:

Danc, kant, leg, lud, parol, mars, promen, rajd, skrib, stud.

M. C. BUTLER.



Komuniko de "Danubo."

Okaze la bulgara-turka milito, la bulgara redakcio, estante okupata, desigas por nedifinita tempo la aperadon de "Danubo." La abonintoj estos rekompencitaj post la finigo de la milito. La ceteraj esp. gazetoj estas petataj represi ĉi tiun komunikon.

LA REDAKCIO.

Novjaraj Decidoj.

(Rakonteto ne por infanoj pro ĝia malbona moralajo).

Malgranda knabo, nomata Petro, vekiĝis la unuan de Januaro kaj faris Novjaran decidon, ke li, tiun tagon, penos plenumi bonan agon al ĉiu, kiun li renkontos. Li, do, frue levigis por komenci. Enirinte la mangō-ĉambron, li ekvidis la kanarion. — Kompatinda etabirdo, — li diris, — ĉiam en kaĝo. Mi malfermos la pordon, por ke vi povu iom flugi en la ĉambro. — Li faris tion, kio plaĉis al la kanario, kaj poste al la kato, kiu jam de longe sopiris je pli intima konatiĝo kun la birdo kaj multe ĝuis la kunigon.

Dume la knabeto iris al la dompordo, por vidi, ĉu ankoraŭ glaciigas, ĉar lia patro promesis lin konduki por provi siajn novajn glitilojn; ĝuste ekstere staris ĉifone vestita viro, kiu tremis pro malvarmo kaj petis almozon. Petro ĉirkaŭrigardis kaj vidis la palton de sia patro. — Ĉu eble la patro kolerigos, se mi donos ĝin al tiu ĉi malriĉulo — li pensis, sed dolĉa rideto vidiĝis sur lia vizaĝo — Kompreneble ne, estas — Novjara Tago kaj sendube paĉjo jam decidis, ke hodiaŭ li ne diros malkomplezan vorton. — Baldaŭ la palto estis en la manoj de l' ĉifonulo, kiu tuj kun ĝi forrapidis.

La matenmangō pasis kiel ordinare, iom malĝojigita por la patrino, ĉar ŝi perdis sian kanarion, kaj por la kato, kiu ricevis batardon pro tute neprava kulpigo, ke li iel ruze malfermis la pordon de l' kaĝo kaj mortigis la birdon. — Mi ne eĉ tuŝis la pordon de l' kaĝo — li pensis al si, — kaj pri la birdo, ĉu estis mia kulpo, ke kiam mi nur deziris karesi ĝin, ĝi flugis rekte en mian bušon? Post tio, kompreneble, li nenion utilis, ĉar li ne povis plu kanti, — aŭ, laŭ mia opinio, kriaĉi, — kaj estis nur pro la fakteto, ke ĝia kadavro malordigis la mangō-ĉambron ke mi englutis ĝin. — La kato antaŭe ne multe admiris la justecon de la homo, sed post tiu ĉi okazintaĵo estis nur pro la boneco de la mangoj, ke li plilonge restis en la domo. Kompreneble Petro, siaparte, diris nenion, ĉar oni ne devas paroli pri siaj bonfaroj.

Bedaŭrinde Petro ne havis tian feliĉan matenon, kian li atendis, ĉar nenie estis trov-ebla la palto de lia patro; tial li ne povis ĝui sian lecionon de glitumado; — plue, se la patro frue faris Novjaran decidon pri koleraj vortoj, li certe ne plenumis ĝin. Preskaŭ Petro bedaŭris sian duan bonfaron, pri kiu ankaŭ li silentis.

Post tagmezo envenis najbarino, amikino de lia fratino Alicko kaj la du ĝoje babiladis, dum Petro aŭskultas, ĝis Alicko diras, — Ho, mi devas montri al vi mian novan ĉapelon — kaj iris

ĝin serĉi. Dum ŝia foresto la knabo, dezirante plaĉi al sia fratino, diris — Kara Margareto, mi esperus, ke vi ne kopios la ĉapelon, ĉar Alicko hieraŭ diris, ke vi ĉiam tion faras aŭ aĉetas similan. — Ĉar li tre ĝentile parolis, tre miris Petro, ke la fraŭlino ŝajne ekkoleris kaj forrapidis, ne atendante la revenon de Alicko.

Vespere, Petro ne trovis multajn okazojn por praktiki siajn bonfarojn. En la domo, oni faris feston, kaj li provis esti kompleza al la vizitantoj: ekzemple, ekvidinte du gejunulojn, kiuj sidas sur la ŝuparo en la mallumo, li senbrue eklumigis la elektran lumon apude; spite tiu pensema ago la junaj paro tute ne estis danka, kaj, ankoraŭ unu fojon, kiam iu fraŭlino perdis buklon dum la danco kaj li redonis ĝin al ŝi poste, kiam ŝi sidas kaj parolis kun kelkaj gesinjoroj, lia frato maledikate kaj kolere forsendis lin. Mi diris, ke li ne trovis multajn okazojn — ne pro tio, ke li laciĝas bonfari — sed ĉar, sufice frue en la vespero, li ricevis informon, ke lia patro deziras vidi lin en la biblioteko. Enirinte, li ekvidis policanon kun la palto. — Petro — diris lia patro — tiu ĉi policano diras, ke li hodiaŭ arestis viron, kiu portas mian palton kaj, laŭ lia rakonto, estis vi, kiu donis ĝin al tiu. — Jes, paĉjo — respondis Petro, iom timigita pro la severa parolmaniero de sia patro — estis bonfaro, kaj, pro la Novjaro, mi deziris ĝojigi lin. — Atendu, Petro, ĝis mia reveno — diris la patro, kaj foriris kune kun la policano.

Ĝuste tiam enkiris Alicko: Petro — ŝi ekkriis — kion vi hodiaŭ diris al Margareto? Ĉi tiun minuton mi ricevis letereton, en kiu ŝi skribas, ke neniam ŝi plu parolos al mi, kaj ke mi demandu de vi la kaŭzon. — Petro klarigis al ŝi kaj al la patrino sian trian bonfaron kaj la kialon. — Petro — subite demandis lia patrino. — Ĉu estis vi, kiu malfermis la kaĝopordon? — La patro tiumomente reeniris la ĉambron, kaj ĉiu, laŭtavoce, rakontas al li la hodiaŭajn bonfarojn de lia filo....

Kuŝante sur sia lito, Petro ja povas kompate konsenti kun la batita kato, kaj, same kiel ĝi, bedaŭris la maljustecon kaj sendankemon de la homo. Baldaŭ alvenis lia patrino, kiu iom konsolis lin, kaj kiam ŝi demandis, ĉu li, la morgaŭan tagon, pli bone kondutos? — li, inter siaj plorgemoj, diras, — Mi provos, panjo, mi provos, kaj almenaŭ mi promesas al vi, ke mi al neniu faros pluajn bonajn agojn. —

L. SWAN, *el Croydon.*



Virino vekis la edzon nokte.

— Kio estas tiu brujo, kiun mi aŭdas en la biblioteko?

— Ĝi estas ja nur la historio sin ripetanta, — respondis dormeme la edzo.

Secretarial Notes.

It has been thought that notes from the Secretarial Department would prove a useful and an interesting feature each month in our gazette. The correspondence received by this Department often contains valuable information and opinions which ought to be placed upon record for the advantage (or, at any rate, the consideration) of the Esperantist Public. In other ways a good deal of important material accumulates here, and it is hoped that by using the medium of our gazette such material may be made use of for the advantage of our cause. These notes may be largely in English, as in all probability the bulk of the matter dealt with is intended to meet the eye of the outsider. When a paragraph interests Esperantists only, it will, of course, be printed in Esperanto.

* * *

A recent examination has been made of the B.E.A. Membership Roll in order to ascertain the occupations of members. As might perhaps have been forecasted, the scholastic profession very easily heads the list, 15 per cent. of our members being Headmasters or Teachers. This is excellent "teaching by example." The Churches account for 5 per cent., as also do Engineers, Physicians, and Civil Servants respectively. Accountants, Chemists, Journalists, Musicians, Solicitors, and Students represent about 2½ per cent. each. In all, 134 different occupations are given, and the curious will be interested to know that we have amongst us a bricklayer, a navvy, a sawyer, and a sanitary inspector. The Army and the Navy are well represented, but we have no Bookmakers, Actors, or Multi-Millionaires!

* * *

Last month we sent to each of our members, as a supplement to the gazette, a form of letter which we asked them to sign and send on to a friend. This was an invitation to membership. A new year will soon be upon us, and the present is therefore the right time to enlist new members. Perhaps some of our friends have not yet posted on that form? If that is the case, will they kindly write their friends at once, in order that new members may have the advantage of a full year's membership. Further forms will gladly be sent on request.

* * *

There are some who say that THE BRITISH ESPERANTIST cannot be suitable for propaganda because of its price. Let us point out, however, that each month over two hundred copies are sent out to Public Libraries, Hotels, and similar haunts of the profane. Every enquirer who writes for information gets a copy. Back numbers are distributed at meetings and sent to the groups. Thus it will be seen our gazette really does serve as a practical aid to propaganda, and perhaps after all the price of threepence is more impressive to the outsider, whom a copy reaches, than a mere pennyworth would be.

* * *

We were recently asked by one of our propagandist friends whether we could quote an actual instance of an International Congress using several languages where vexation and delay had been caused by diversity of tongues. Our friend asked us to send him a report and a copy of the agenda in several languages if such existed. We could not oblige with documents, but mentioned the case of the International Labour Congress held last year, in which vigorous protests and complaints were made on account of the language difficulty. Can any of our readers inform us whether such documentary evidence referred to is obtainable? If the organisers of all International Congresses could only be made to realise the hundredfold utility of an international language, what a world of wasted time and worry would

be prevented. Do they know what Whittier would say to them?

*For of all sad words of tongue or pen
The saddest are these, "It might have been."*

In the November number of *The Nineteenth Century* there is an article dealing with the war in the Balkans. In referring to the final settlement between the Balkan States and Turkey, the author, Major-General Knox, bearing in mind the fact that four nations are involved in the Balkan League, says:—"What a chance for the new Kingdom of Utopia with Esperanto for a State language, to solve the antagonism of the existing Babel of tongues." Perhaps it is not intended that the words shall be taken quite literally, but Esperantists know that the suggestion is thoroughly practical, and that if a neutral language were adopted for inter-state affairs in the new country, a serious difficulty would be solved. To carry it through, courage, enterprise, and enthusiasm are necessary. The four states have shown unmistakably that they are not lacking in these qualities, and we may therefore hope. In this connection the official approval and recommendation to teachers in Bulgarian government schools of a Bulgarian text-book on Esperanto is not without significance!

Baldaŭ ni staros apud la mortlito de la nuna jaro, kaj ni devos prepari nin por la laboro de la jaro 1913. Rapide alproksimiĝas la Kristnaska tempo kaj la Festa Sezono portantaj al ni sentojn de plezuro kaj bonvolo. Do, la Sekretario kaj Stabo sendas al ĉiuj membroj, legantoj kaj klientoj plej korajn bondezirojn por Feliĉa Kristnasko kaj sukcesplena Novjaro. Vivu Zamenhof kaj nia Lingvo Internacia!

The Spread of Esperanto.

The way in which the international language, Esperanto, is gradually spreading in technical circles, as in other departments of modern life, is strikingly illustrated by the following circular recently issued (in Esperanto) from the Bureau of Standards of the American Department of Commerce and Labour at Washington:—

DEPARTMENT OF COMMERCE AND LABOUR,
(Bureau of Standards),
WASHINGTON, D.C.

1st July, 1912.

To all whom it may concern:

We, the undersigned officers of the Bureau of Standards, hereby announce that we read, write, and speak Esperanto, and that at the beginning of the present year we established a group of persons among whom the international language is in daily use. We wish to make known the fact that all enquiries regarding this Office or its scientific work, which are addressed to the Office and written in Esperanto, will, if it be so requested, be answered officially in the same language; and this of course applies equally to enquiries sent unofficially to any of the undersigned.

Further, we take this opportunity of expressing our desire to enter into relations with all Esperantists interested in the departments of science with which our work is concerned, and of inviting all Esperantists who may visit Washington to visit our Office; they will be shown round it by *samideanoj* (fellow-Esperantists).

We are, respectfully,
HENRY D. HUBBARD,
VICTOR L. LOWE, } Administrative Department.
N. C. BRAITHAWAITE,
J. C. PEARSON, Electrical Department.
H. W. BEARCE, Volumetric Department.
D. R. MILLE, Measurements Department.
WILLIAM BLUM, } Chemical Department.
E. C. MACKELVY, } Thermometric Department.
H. K. GRIFFIN,
H. C. DICKINSON,

Libraro kaj Gazetaro.

Plena Klasika Libro de Esperanto.—Jen libreto, dediita al la gloro de l' genia aŭtoro de l' Fundamento, okaze de la dudek-kvinjara jubileo de Esperanto, kiun ni ne povus tro rekomendi al niaj legantoj. Pli ol iam, en la nuna periodo de nia progreso, kiam oni ĉiuflanke ekaplikas Esperanton por la praktikaj kaj pozitivaj bezonoj de la internacia vivo, estas necese memori, ke Esperanto efektive estas lingvo, al kiu, tutsame kiel al sia gepatra lingvo, ĉiu Esperantisto devas rilati kun amo kaj respekto. Tiun amon kaj respekton ni plej bone montras, skribante Esperanton bele kaj simple laŭ la Fundamento, kiun donis al ni D-ro Zamenhof. Grandan helpon por tio alportos la "Klasika Libro," kiu enhavas: la dek ses oficialajn regulojn de l' gramatiko kaj ĉiujn radikojn ĉu de l' Fundamento (Antaŭparolo, Ekzercaro, Universala Vortaro), ĉu de l' Oficiala Aldono, kun franca, angla kaj germana tradukoj. Krom tio enhavataj estas la "Konsiloj pri enkonduko de novaj vortoj en la komunan lingvon," faritaj de l' Akademio, kaj la Bulonja Kongresa "Deklaracio pri Esperantismo." Plej utila kaj oportuna kunigo, pri kiu ni gratulas la eldonintojn (Presa Esperantista Societo). Konscience ellaborita de S-roj Th. Cart kaj Em. Robert, kaj kun granda zorgo presita de S-ro V. Polgar, ĝi estas vera juvelo, kiun ĉiu Fundamentisto, t.e. ĉiu Esperantisto volos posedi.

Bindita en eleganta fleksebla tolbindaĵo poſtformata (3½ x 2½), kun 160 paĝoj, en firma kartona ingo, la verketo kostas po 1 ŝil. 2 p. afrikite. Specialaj pokvantaj prezoj por grupoj, k.t.p. — petu folion.

Estu Homo! de Charles Wagner el la Franca Lingvo, tradukis Sam Meyer. 97 pp. Sm. 0.50. Presa Esperantista Societo, Paris.—Tiu ĉi ĉiel rimarkinda traduko, rekomendita de la Internacia Unuiĝo de Esperantaj Verkistoj, prezantas konsilojn al pensemaj homoj, de la konata Pariza pastro Charles Wagner, por bone vivi kaj morti. Gi konsistas al dek naŭ ĉapitroj, dividitaj laŭ kvar rubrikoj: De kie ni venas? Kiu ni estas? Kion ni devas fari? Kaj kien ni iras? Tute leginda estas la verko, kaj dank' al la mirinda bonstilo de S-ro Meyer, la legado estas vera plezuro. La presado estas bele kaj klara, kaj preseraroj tute mankas.—W.M.P.

Lingvo Internacia, N-ro 8-9-10. Aŭg.—Sept.—Okt., 1912. (Paris, Presa Esperantista Societo, 35 rue Lacépède).—Tiu ĉi numero (ĉu ĝi estas volumo?) de "Lingvo" bone subtenas sian antaŭan reputacion, kaj ĉio inter la du kovriloj estas tute leginda. Precipe estas raporto pri la 8a Esperantista Kongreso en Krakovo verkitaj de Ned Kathryn: raporto, kiu facile superas ĉiujn raportojn, kiuj jam aperis en la multnombraj ĵurnaloj. Efektive, ĝi estas pli, ol raporto, ĉar dum la legado, oni estas transportita en la kongreson, kaj denove vivas la Esperantistin vivon. Ĉiuj detaloj, ĉe bagateloj, montrigas kvazaŭ en kinematografa bildo. Rapide oni estas jen en akceptejo, jen festo, jen speciala kunveno: flugas bona vorto por tio, kio ĝin meritas; ati la ūbezzone, milda admono aŭ respektplena kaj gentila kontraŭstaro. Entute ĝi estas skribita en maniero, libera, senpartia kaj konscienza, sed ĉiam ĝaja. Ĉu vi volas uzi la vortojn *heziti*, *konkeri* aŭ *menso*? Ĉu vi volas scii, kiel konata propagandisto faris vojagon, kiu komencis bonege kaj finigis terure? Aŭ ĉu vi preferas konatigi kun la sorĉisto, kiu tiel lerte re-beligas la sinjorinojn? Se jes, mi konsilas, ke vi legu tiun ĉi spritan rememoraĵon de la Jubilea Kongreso. En grava redakcia artikolo, Profesoro Th. Cart diras: "Post la dudekkvinjara heroa periodo alvenas nova pli praktika, dum kiu nia tasko estas enpenetri en ĉiujn rondojn, por ilin almiti. La lingvon mi devas prezenti nur kiel lingvon, ĉar per si mem ĝi estas neno alia. Sed ni ne timu: ĝi senrimarke kunportos kun si

la internan ideon, kaj ĝia venko ne estos nur lingvo!" —A.E.L.

"Kie estas amo, tie estas Dio."—De L. Tolstoj, trad. N. Kabanov. (No. 7 en la serio). Prezo 7sd.—Tiu ĉi rakonto estas bazita sur la vortoj el la Evangelio de Mateo.—"Car vi faris tion por unu el Mioj malpliagaj fratoj, vi faris por Mi." Gi rakontas kiel maljuna botisto, farinte diversajn servojn al siaj proksimuloj, ekkonsciis ke li tion faris al Kristo mem. La diversaj okazoj estas vigle prezentitaj laŭ la konata maniero de la genia rusa aŭtoro. La traduko estas tre bone farita, sed ni rimarkis oftan uzon de la vorto "mem" kie ĝi ne ŝajnas havi ian precizan signifon. Spite tio la stilo ĝenerale estas tre flua kaj facila.—A.B.

De la Piedoj de la Majstro, de Alcyone (J. Krishnamurti), tradukita de W. W. Mann el la angla originalo. Eldonita de Presa Esp. Societo, Parizo, kaj Theosophical Publishing Society, Londono. Prezo, lukse bindita, 2 ŝil. p. afr.—La rimarkinda kaj ĉarma originalo de ĉi tiu traduko, verkita en 1910 de Hinda junulo apenaŭ dekvinjara estas tradukita jam en pli ol dek naciajn lingvojn, kaj trovis amantojn en ĉiu lando, kien ĝi penetris. En neofte simpla kaj ĉarma lingvo — kiun oni retrovas sendifektan en la Esperanta traduko — ĝi prezantas gvidon je homa konduto tiel altega — kvankam samtempe tiel esence simpla kaj funde praktika — ke ĝi "prenas rangon kun la etiko de la grandaj Sanktaj Skriboj de la mondo." La tolerema spirito de la instruo en ĝi enhavata ja memorigas iom pri la altaj idealoj eldiritaj de D-ro Zamenhof antaŭ kelkaj jaroj en lia pensiga brosuro "Homaranismo," kaj pri liaj paroloj, okaze de la Unua Tutmonda Raskongreso, pri "neutrala" religia etiko uzota por interreligiaj rilatoj de l' homaro, flanke de Esperanto por la interlingvaj rilatoj. Kiu sentas ĉe l' koro deziron interproksimi la homojn etike kaj religie, tiu devus nepre la libreton posedi. En antaŭparolo, Sino Annie Besant klarigas, ke la instruoj, kiujn la libro enhavas, estas donitaj al Alcyone de lia "Majstro," dum tiu ĉi preparis lin kiel disĉiplon al Iniciigo, kaj estas transskribitaj de li laŭ memoro. Tiu sola vorto Majstro, en la bušo de Hindo, diras volumojn, ĉar ĝi proklamas la ekziston de tiu antikvega "Vojo," akra aŭ mallarga kiel razilo, kaj samtempe la ekziston de la "Majstroj," kiuj donas la duan naskigon, aŭ eniron en tiun Vojon. Ĉiuj aŭtentikaj Sankto-skriboj de la mondo faras almenaŭ aludon al tiu Vojo, sed en la okcidenta mondo ĝi estas konata eble nur en kelkaj ordenoj de la Katolika eklezio.

Kompreneble estas parolite en tiu ĉi libro nur pri la prepara vojo, kiu kondukas al la efektiva Vojo tra la pordo de l' unua granda Iniciigo. Ĉiu studento de la misticismo tuj rekonos la kvar taŭgokondiĉojn de la prepara vojo: Distingado, Sendezireco, Bona Konduto kaj Amo, kaj la ses specialajn necesajojn pri Konduto. En ĝia interna (aŭ esotera) senko, tiu libro ne estas por la ordinara mondamento, sed por tiu, kiu jam komencis travidi la vantecon kaj nesufiĉecon de l' ekstera mond vivado, kaj kiu vidis, ke lia plej granda felico konsistas en la senrezerva sinoferado al Dio kaj unuiĝo kun Li.

Cedante al la granda deziro fari citojn, ni donas la jenan paragafon, kiu estas tute karakteriza de la senfina toleremo de la hinda klerularo:

"Al ĉiuj vi devas senti perfektan toleremon, kaj koran intereson tiom al la kredo de alireligianoj, kiom de samreligianoj. Ĉar ilia religio estas tiel same vojo al la plejalta, kiel la via. Kaj por helpi al ĉiuj, vi devas ĉiujn kompreni."

Al tiel bela enhavo, decis bela prezento, kaj tio efektive sukcesis domi per arta bindo kaj tre zorga komposta la firma V. Polgar, Parizo, kiu ja havas reputacion kiel unu el niaj plej kompetentaj kaj fidindaj Esperantistaj presistoj.—ESSEN.

Esperanto-English Dictionary, by E. A. Millidge. (496 pp., large 8vo., Stead's Publishing House, bound in limp cloth, rounded corners). — It is fitting that this dictionary should have appeared in the present year, *la jaro de la 25-jara jubileo de Esperanto*, a year which marks a memorable stage in the life of our *kara lingvo*. For a good dictionary is a worthy monument for a language, and this dictionary is good, thoroughly good, from the first page to the last. Mr. Millidge has been working at it — a labour of love — for several years past, and the whole *Brita Esperantistaro* has been awaiting its appearance with keen anticipation. That anticipation will now become joyful realisation. It is not often that a *recenzisto* feels impelled to enthusiasm by the works which he has to review; but here is one which does move one to hearty and unqualified enthusiasm, enthusiasm not only for itself as an excellent and most scholarly achievement, but enthusiasm also for the language which has made such an achievement possible. Some books are an event: and this is one of them.

It is difficult within the limits of a short review to give an adequate idea of all the new dictionary means for Esperanto in English-speaking countries. Of this those who use the dictionary must judge for themselves. We would like here, however, to deal with some of the thoughts which present themselves as one turns over its neatly and clearly printed pages.

First, and above all, one is impressed with the exuberant richness — a richness verging indeed at times almost on the superfluous — of Esperanto. While using the language, with tongue and with pen, for some ten years past, we have of course felt and realised its resources and possibilities; but here we have, in black and white, page after page of linguistic treasure heaped up right before one's eager eye. Delightful compound words, delightfully rendered into choice but homely and idiomatic English, meet us at every turn; definition after definition of roots, which, though clear enough to the practised Esperantist, need explanation to the student who has not yet ventured practically into the international life of Esperantoland. And as we read, we realise that the author is no mere compiler, no mere theoretical anatomist of isolated words and phrases, but a real student of a loved and living language, of language as a splendid means of communication of vital ideas and emotions between man and man, and, above all, of a language which is destined to be the vehicle for the transmission internationally of that wonderful *nova sento* which is finding expression in every nation in these wonderful and stirring times. To anyone who has a love for words as realities, to read this dictionary is like reading a romance. For one feels that the words and examples given — there are in all some fifty or sixty thousand of them, mainly grown from fundamental roots — are not ingenious inventions of the author, but the real product of the international mind expressing itself in Esperanto, treasures of hill and plain culled in yearlong travel through the varied landscapes of our Esperanto literature, and rich, for any who have travelled, or have it in them to travel the like charming ways, with a thousand happy memories and associations of intercourse and literary adventure. So numerous already are the books in our Esperanto libraries that it would be beyond the leisure of most *samideanoj* to read them all, and yet in all of them is to be found something of literary and linguistic value and import. In such a dilemma this dictionary does yeoman service, and enshrines a rich heritage for ourselves and Esperantists yet to be. It is an epitome of all our books, the essence of our fresh young literature.

So much for the general impression produced by the book. Among particular excellencies which appeal is the system of *cross-referencing*, by which, under a

given root, other roots or words of allied meaning are suggested, as alternatives or as words liable to be confused. Under *avert'*, for instance, *admon'* and *singard'* are suggested; under *auspicioj*, *favor'* and *protekt'* are given as possibly more precise. Alongside *avid'*, we have *avar'* and *desireg'* — and so on. This is a valuable feature. Another is the indication, by means of *special signs*, of roots taken respectively from the *Fundamento* and the *Oficiala aldono*. In other words, the student has here a test for the comparative "authoritativeness" of words: all so marked have passed the test of usage; all others, excellent though many of them may be, are as yet on trial at the bar of our international life. Finally, an appendix gives words which, although not established enough to justify a place in the body of the work, are yet gradually getting a footing, and will probably, by usage, one day win full right of entry into the language. Students of *natural history* will appreciate the completeness of the dictionary in regard to the nomenclature of birds, beasts, insects, trees, flowers, etc., as many as 4,000 such names being given, each with its precise *Latin equivalent* to fix the term.

The choiceness and fullness of the English equivalents make the volume a valuable help to foreigners — and they grow ever more numerous as the years go by! — who wish to use Esperanto as a key to the mysteries of our subtle mother-tongue. As for compound words, suggestive and beautiful examples are to be found on every page; teachers will simply revel in the stores here carefully collected for their permanent use and enjoyment. Fortunate students of the present day, who have at their disposal so fascinating a guide! Frequent Zamenhofian examples, always with a correspondingly classic English equivalent, are used to enforce vividly in a phrase the meanings of particular words. We would wish that every intending translator of an English work into Esperanto might be subjected to a thorough course of study of the words and equivalents here given. Its effect could not but be very salutary on the over daring! Fresh excellencies reveal themselves every time one opens the book, but space forbids our going further. *Ciu devas gustumi por si mem!*

In conclusion, the whole aim and purpose of this dictionary in the mind of its author is evidently to help Esperantists to appreciate and preserve with love and respect the exquisite simplicity and richness of their language. To fulfil such a purpose faithfully requires a rare gift: the ability to put one's own personality into the background, and to record things not as one fancies they should be, but as they are. The true function of a lexicographer is to be the impartial historian of language; and the merit of this dictionary lies in the fact that its author has known how to choose out and present to us lovingly the best in our language, leaving the charm of its beauty and simplicity to work upon us its own unfailing magic. Our hearty congratulations then, not only to Mr. Millidge upon the most successful completion of a unique piece of literary craftsmanship which will be of great service to a great cause, but also to English-speaking Esperantists, whose privilege it will be to use the book! And we can only wish for our fellow Esperantists abroad the like happy fortune, to wit, speedily to have in their own languages Esperanto dictionaries on the same wise and scholarly plan. — W. MANN.

Greeting Cards. — A further supply of the postal greeting cards published by the B.E.A. last year has been issued to meet the demands of the coming Festive Season. The design in black and white is by Mr. C. A. Sheehan, the originator of the well-known Esperanto postcards issued by Raphael Tuck & Sons. Price, per packet of twelve, 7d. post free, from the office of the B.E.A.

Princo Serebrjanij : Historia romano, tradukita el la rusa lingvo de S.-ino M. Sidlovskaja. Ĉi tiu romano, kiun originale publikigis la aŭtoro, Grafo A. Tolstoij, en 1863, prezentas tre vive kaj en tre verſajna maniero la historion de la tempo de Ivano IV., nomita la Terura. Ivano, kiu estis samtempulo de reĝino Elizabeto de Anglujo, kaj kiu la unua pretendis al la titolo de caro de Rusujo, estas prezentita kiel sangavida frenezulo, kiu kovris siajn krimegojn per mantelo de paradema pieco. Sovage malamante la nobelojn (bojarojn), kiujn li suspektis fari komplotojn kontraŭ li, li tamen ĉiam tre zorge celadis reteni la bonvolon kaj amon de la popolo. Malpacinte kun la bojaroj, li minacis abdiki, kaj foriris el Moskvo. Ĉiuj surgenue petegis lian revenon ! Nur je la propraj kondiĉoj, li konsentis repreni la caran rangon. En la Aleksandra antaŭturbo, kien li retirigis, li cirkauis sin de speciale elektita gvardio nomita "opriĉnikoj." Tiuj ĉi, kiel "caraj homoj," arogis al si la rajton rabi kaj detru iila vilaĝojn, tute laŭ sia plaĉo kaj bontrovo, kaj sen timo de puno. Krom tiuj rabistoj *oficialaj*, ni konatigas en la romano kun iu neoficiala bando de rabistoj, sub la estreco de Ivaĉjo Ringo, kiu eble vokos en la memoron komparon kun nia rabistohero Robin Hood. Iu neimitbla figuro estas Dmiĉjo, unu el la homoj de Ringo, kiu aliĝis al la bando por venigi sin kontraŭ la opriĉnikoj. Sajne stulta kaj kapmola, en batalo li estis kiel nekontraŭstarebla Trojano. Princo Serebrjanij, kies aventurojn la romano speciale priskribas, estis kavaliro tro sincera kaj verama por plaĉi al la ĉirkauita de flatantoj caro, kaj kelkajn fojojn lia vivo apenaŭ savigis el la mano de la ĉiopova Ivano la Terura. Mi ne devas forgesi paroli pri unu alia elstaranta figuro, la nobelo Morozov. Ĉar tiu ĉi pro sia fiereco estas en malfavoro, la caro permessas, ke unu el la opriĉnikoj penu forrabi la edzinon de Morozov, kaj mem, kiel ruzo, reestablas la bojaron en sian favo-ron, invitante lin al festeno. Tie li malhonoras la maljunan bojaron per surmeto sur lin de arlekena kaftano, kaj postulas de li ŝercojn. La de longe detenita instinkto de ofendita fiereco elsprucas, kaj Morozov denuncas la farojn de la sanga caro, finante tiele :—

".... 'Via cara mosto,' daŭrigis Morozov, pli altigante la voĉon : 'via nova arlekeno staras antaŭ vi. Aŭskultu lian lastan ŝercon ! Dum via vivo la bušo de l' rusa popolo estas sigelita de timo ; sed finigas via bestsimila regado, kaj restos en Ruslando nur memoro pri viaj agoj, kaj transiroj via nomo de posteuloj al posteuloj por eterna malbeno, ĝis fine venos la terura Lasta Jugo !'" (p. 236).

La traduko de S.-ino Ŝidlovskaja estas tre bone farita, kiel oni atendus pro la antaŭaj tradukoj de la sama plumo, ekz., "La Tri Mortoj" (de la pli konata L. Tolstoij). La kritikeblaj esprimoj estas ne-multaj. Jen estas kelkaj : "Ĉiuj opriĉnikoj falis mortaj" (p. 97) (*Malvivaj, mortintaj*) ; "speco da homoj" (p. 137) (*speco de*) ; "traigaj okuloj," p. 274, sajne signifas *penetrantaj okuloj*, sed ĝi ne portas en si logike tiun sencon ; "onidire" (*laŭ famo, diro*) estas nova al mi kunmetaĵo, sed sajne tute bona. La fremdaj esprimoj en la teksto estas bone klarigitaj per pagfinaj notoj, kio estas ŝatinda helpo al la nerusa leganto. Cetere, la tuta libro estas tre valora aldono al nia internacia kolekto.—NOREMAC.

Hinujo.—S-ro K. C. Ŝan, sek. de la Ĉina Esperanta Asocio, petas al ni el Ŝangha, ke ni komuniku al niaj legantoj jenon : "Koresponda Kurso Esperanta por ĉinoj estas regule aperanta po kajeroj, en formato de ĉina libro. Gi ne estas abonebla, nur interŝangebla je Esp. gazetoj ĉiunumere. Oni rekondos en N-roj 7, 14, 21, 28 ĉiujn librojn kaj gazetojn senditajn al la legantoj, per aldonitaj kromfolioj — sed nur se oni donacis la sendajojn al la muzeo de Ĉina Esperanta Asocio. Sjn turnu al la Sek., 683, Myburgh-road, Ŝangha, Hinujo."

Japan Trade Review (Tokyo, Japan).—En la jalia numero ni legas, ke tiu ĉi jurnal estas la sola en Japanujo, angle redaktita, kiu speciale celas la pris-kribon de la japana komerco internacia. Gi pritraktas la reciprokan komprenon inter la oriento kaj okeidento, kaj donas bonan informon pri ĉiaj artikoloj komercaj en Japanujo. La redakcio estas preta enkenduki Esperantan fakon se la Esperantistoj mem tion postulas. Ni konsilas al ĉiu leganto skribi tuj por senpaga specimeno de tiu ĉi gazeto. Adreso : *Japan Trade Review*, Tokyo, Japan.—A.E.L.

The Esperanto Teacher.—Ni direktas la atenton de niaj legantoj al la anonco pri la nova eldono (kvina) de la populara lernolibro de F.-ino Helen Fryer. Ĉiu bona trajto de la antaŭaj eldonoj estas konservitaj ; al ili estas aldonitaj, en la nova, vortareto angla-esperanta, 35-paĝa, kaj legopeccetoj facilaj verkitaj en Esperanto de anoj el dek diversaj nacioj. La libreto plidikigis kaj plibonigis : la prezo restis sama — ses pencej. Malgranda elspezeto por akiri rajton de civitaneco en vastega kaj atloga lando — Esperantujo !

Alvoko !

Scio estas potenco ! La scienco nobligas !

Samideanoj ! La plej granda trezoro, la plej efika armilo de la homo — estas *la ĝusta mondkompreno*, la kompreno de ĉiuj gravaj faktoj kaj aperoj, okazantaj aŭ jam okazintaj en la mondo. La homa individuo vivanta sole per besta vivo, vekanta en si neniajn noblajn sentojn, fremda por ĉiaj idealoj — ne meritas la nomon homo.

La tasko de la "Esperanta Scienca kaj Literatura Libraro" estas per kolekto da malpli grandaj libroj el ĉiuj regionoj de la scio, aŭ per pli ampleksaj verkoj kaj facile kompreneblaj sciencaj priskriboj veki la homan konscion en ĉiuj direktoj kaj aperoj de la vivo, partopreni en la disvastigado kaj profundigado de la homa mondkompreno.

Sed krom tiu generala programo nia "Libraro" metis al si ankoraŭ alian, pli specialan taskon. Kiel oni scias, la poresperanta propagando sole tial ne povis ĝis nun disvolvi ĉiujn siajn fortojn, ĉar mankis al ĝi *la malmultekosta libro, tiu plej bona propagandilo*. Neniu povas nei, ke nia esperanta literaturo potence disvolviĝas, tamen ni devas ankaŭ sincere konfesi, ke malgraŭ tiu potenca kaj rapida disvolviĝado ne ĉiuj branĉoj de la literaturo ĝis nun disvolviĝis — tiel ekzemple vasta, tiel grava kampo de *sciencia populara literaturo* kuſas ankoraŭ malzorgata kaj nekulturata de la esperantistaj semantoj !

Samideanoj ! Ĉu nia literaturo longe ankoraŭ devas sole servi al esprimado de belsonaj frazoj kaj subtilaj parolturnoj ? *Aŭ ĉu prefere jam venis la tempo, ke ĝi fariĝu luma disportanto de ĉiuj utilaj kaj fruktodonaj ideoj — potenca batalilo kontraŭ ĉiuj nigraj fortoj kaj perfortoj, premantaj la mondon ?*

Por almenaŭ en malgranda mezuro efektiviĝi tiun ĉi idealon, ni, subskribintoj decidis eldoni serion de libroj, kiuj per la sekanta eco principe diferencas de similaj eldonajoj :—

Ciu libro kostas tiom, kiom kostas ĝia preso.

Tiel arangita prezo ebligas al ĉiu libro la plej grandan disvastiĝon, ĝi ebligas ankaŭ al ĉiu samideano la plej efikan kaj malmultekostan propagandon.

Por alsendo de almenaŭ 1 Sm. (2 kronoj 40 helero en aŭstria mono) ĉiu grupo aŭ aparta samideano ricevos senprokraste kaj afrankite kolekton de jam aperintaj libroj *en amplekso de almenaŭ 640 paĝoj da teksto*.

Ĉiuj mendoj kaj korespondajoj estu direktataj al Antoni Czubrynski, Krakovo, Strato Retoryka 10, Aŭstrio-Galicio.

Samideanoj ! Helpu al la sukceso de la "Libraro," helpu al la sukceso de la ideoj, kiujn ĝi proklamas !


Esperanta Pregejo en Londono-

Kiel oni scias, dum la lastaj monatoj okazis Diservo en Esperanto en nordlondona paroha ĉambro, kiuj altiris ĉiam kreskantan ĉeestantaron. Ni havas plezuron anonci, ke de nun ĉi tiuj Diservoj okazos en la konata pregejo Harecourt, Canonbury, London, N., la duan dimanĉon en ĉiu monato, je 3.15 p.t.m. La propravolan inviton de la Harecourt'a ĉefmembraro, ke la londona esperantistaro trovu ĉe ili religian hejmon (fakto unika en la historio de Esperanto) ni ŝuldas al la fervoraj klopodoj de S-ro H. C. Philp, kaj la simpatio de la klera pastro, Rev. D. Glanant Davies.

La unua Esperanta Diservo en Harecourt pregejo okazos Dec. 8, kiam faros la predikon S-ro H. Bolingbroke Mudie (prezidanto de la B.E.A.) kaj solkantos F.-ino G. Cosmetto (argent-medalistino). Tiu dato sendube farigos epokofara en la historio de nia lingvo. La arango datros ĝis Aprilo, 1913, kaj kreble farigos definitiva, se nur oni ĉeestos la Diservojn sufice multenombre por pravigi ilian pluekzistadon. Grave do estas, ke ĉiu interesata Esperantisto almenaŭ en nordlondono farusianeblon, subtenila aferon perakurata kaj konstanta ĉeestado.

Laŭ la vortoj de unu el la iniciatintoj de la Diservo: "Oni volas uzi la plej belan el ĉiuj lingvoj por la plej alta el ĉiuj celoj — la servo al Dio. Uzante neŭtralan lingvon, Kristanoj el ĉiu sekto povos momente forgesi siajn etajn malkonsentojn, kaj unuigi por komuna adoro antaŭ la komuna sinjoro; tiel Esperanto povos servi kiel unuigilo ne nur internacia, sed religia ankaŭ."

La Diservoj, kompreneble, estos tute nesektaj laŭ karaktero, tiel, ke ĉiu povos ilin partopreni sen ofendo al



HARECOURT CHURCH, ST. PAUL'S ROAD, CANONBURY, N.

La unua Esperanta Pregejo en Londono.

la konscienco. Oni petas, ke ĉeestontoj kunportu la "Himnaron."

Kia ajan lia religia kredo aŭ nekredo, sendube ĉiu Esperantisto konsentos, ke tiu starigo de publikaj Esperantaj Diservoj estas afero ĉiel tre grava por la progresigo kaj propagando de Esperanto en Londono.

Harecourt Church staras en St. Paul's-road, inter la servojaj stacidomoj *Canonbury* kaj *Highbury*; multaj omnibusoj kaj tramoj pasas proksime (interalie motor-omnibusoj 4, 19, 43). Ĝi estas rimarkinde bela konstruaĵo, kun sidloko por pli ol mil personoj, okangula laŭformo, kun volbita plafono. Ĝi posedas bonegan triklavaran orgenon, kaj ĉiurilate estas ejo tre konvena por Diservoj en nia bela lingvo.

Antaŭ ol kunveni en la nuna konstruaĵo (1857), la kongregacio dum pli ol du jarcentoj kunvenis en Hare Court en la Civito, de kio venas la nuna nomo Harecourt.

John Strudwick, unu el la ĝiaj unuaj diakonoj, havis spicbutikon sur Snow-hill, sur kies elpendaĵo estis pentrita stelo — ĉu iom profete al la nuna rilato de Harecourt kun nia verda stelo?

En lia domo mortis John Bunyan (aŭtoro de *Pilgrim's Progress*). Multaj aliaj personoj konataj en la angla historio havis rilatojn kun Harcourt.

De sia fondigo ĝis la nuna tempo la kongregacio Harecourt laboris antaŭenigi la liberecon, progreson kaj fratigon de la homaro. Restas al niaj samideanoj certigi, ke la bonveno nun etendata al ili komencu plian brilan ĉapitron en la arhivoj de ĉi tiu historia pregejo.—M.C.B.

Posta Kesto.

Fianĝo.—F.-ino L. Poppleton kun S-ro H. Hardaker, ambaŭ anoj de la grupo Esperantista en Burnley. *Koran gratulon!*

Maria Bartholomé en Essen-an-der-Ruhr, Germanujo, korsalutas siajn geamikojn, kaj diras plej bonan dankon pro ilia gastameco kaj amikeco dum sia restado en la Yorkshire'a lando. Vivu Esperanto, vivu angla Esperantujo!

D-ro W. Marchand (Villa Luginsland, Davos-Dorf, Svisujo), kies interesajn prelegojn en Esperanto pri la Geologio jus ĝuis britaj samideanoj, sendis jenan letron:—"Forlasante Londonon, ĉar la stato de mia sano devigas min iri al la Svisaj montoj, mi deziras diri koran dankon al la anglaj Esperantistoj, kiuj multe agrabligis al mi la restadon en Anglujo en la jaro kaj jarduono dum kiu mi ĝuis ilian gastamecon. Mi prenas la okazon, esprimi la esperon, ke per la Esperanta lingvo amikaj rilatoj inter Britoj kaj Germanoj farigu pli oftaj, kondukante al bona interkompreniĝo de la popoloj."—Ni kore deziras al nia amiko baldaŭan kaj plenan resanigon!

Johann Martin Schleyer.

En Litzelstetten apud Konstanz (Baden) mortis katolika prelato Johann Martin Schleyer, la fama aŭtoro de tutmonda lingvo *Volapük*, vera iniciatinto de aktiva, praktika agado por nia bela ideo.

Naskita en la jaro 1831 en Oberlando (Baden, Germanlando), Schleyer jam en gimnazio estis "lingvema." Studinte la teologion en la Freiburga Universitato, li pastrigis, sed la tutan sian libertempojn li pasigis per lingvo-scienco: pli ol 50 lingvojn li ellernis, interalie la hinan, hindan, persan, fenician, sanskritan, eskimosan, k.t.p. En la jaro 1879 Schleyer elpensis kaj sukcese disvastigis *Volapük*, sed en la jaro 1889 la tro artefarita lingvo komencis regresi kaj cedi la lokon al Esperanto, pli facile, pli natura. Rondeto de volapükistoj radikale reformis *Volapük* kaj nun ili propagandas tiun lingvon sub la nomo "Idiom Neutral," kiu siavice estis reformita kaj rebaptita kiel "Reform-Neutral," spite ke Schleyer ne aprobis ilian reformon kaj lastajare ellaboris mem tute alian planon de reformoj, sed lia nova reform-projekto, — atestas Sr-o W. Rosenberger, — estas pli artefarita ol la primitiva *Volapük*. Suferinte la tragedian fiaskon, Schleyer jam skeptike, pesimisme rilatis al la moderna movado, al la ideo mem de lingvo internacia. — B.K.

Esperanto Progress Abroad.

To the Reader.—The heading "Esperanto Progress Abroad" may not convey to you at first sight the fact that this page of THE BRITISH ESPERANTIST is in itself a striking demonstration of the possibilities of Esperanto. During the year there are printed under this head reports of Esperanto activity in *thirty different countries*, sent to us by special correspondents in all parts of the world. Were these reports sent in in the native language of the writers—Roumanian, Dutch, Bulgarian, Turkish, Japanese, Chinese, Servian, Russian, Finnish, Swedish, as the case may be—we should be hard put to it to find interpreters for them all swiftly enough for journalistic purposes. As it is, all these reports reach us in Esperanto, and the Roumanian's or the Finn's report presents no more difficulty—or we rather should say is no less easy—than that of the Chinaman or the Japanese. People often ask: "But has Esperanto a future?" The future, we reply, is on the knees of the gods; but what we do know is that Esperanto *has* a present, and while hundreds are talking and writing sentimentally about world-brotherhood, often without the experience of an hour's real conversation with anyone outside their own country, thousands and thousands of Esperantists are simply "getting ahead" just as quickly as they can with the practical side of the business. When will journalists, scientists, and above all business men, wake up to the importance of the splendid means of international intercourse which lies ready to their hand?

Bulgarujo.—Nia speciala korespondanto en tiu lando, S-ro Ivan H. Krestanof, en Sofia, sendis al ni en unu sia letero jenon, kiun oni legos kun intereso, rilate la okazoj, kiuj farigis lastatempe en la Balkana Duoninsulo: "Nun mi informas vin, ke ni estas sur la sojlo de milito kontraŭ Turkujo. Jam de kelkaj tagoj estas anoncita generala mobilizado kaj samtempe milita stato — per regaj kazoj — en la tuta Bulgarujo. Cio bulgara estas sur piedo. Cio estas haltigita kaj fermita nur ne la kazernoj, kien ĉiumomente novaj kaj novaj fortoj alvenas. Neniu estas certa pri la morgaŭa tago. La teruraĵoj de la milito jam prezentiĝas, kaj la batalkampo jam vidigas. Eble mi ankaŭ devos iri, ĉiuj iras.... Kompatinda Esperantisto — homamanto kaj homfratiganto — kiu por la libereco de unuj devas sange kontraŭbatali aliajn homojn! Antaŭ la necerteco mi sendas al vi — kaj per vi al ĉiuj gesamideanoj — miajn plej korajn salutojn." Kaj sur la karto estas aldonita: "Akeptu kurajn salutojn de nevolonte volontuliginta amiko, H. Hristoskoff. Antaŭen kun credo!"—Al niaj Balkanaj samideanoj, al kiu la sorto difinis partoprenon en internacia sangoversado, ni deziras iaman feliĉan revenon hejmen. Ilij eblaj spertoj sur la batalkampo nepre faros el ili ankorat pli fervoregajn apostolojn de la paco...

France.—On October 12 the twelfth monthly dinner of the PARIS Esperanto group took place in the Hotel Moderne—a *familia festo*, made especially gay and bright on this occasion by the number of eminent Esperantists present from other lands. For the first time four members of the Esperanto "Akademio" were present—one German, one Italian, two Frenchmen—and round the table sat representatives of Japan, China, Mexico, Estonia, Hungary, England, etc., Esperanto providing a perfect means of intercourse to this extremely international company. Mons. Bourlet, the president of the group, amused the guests by telling of his adventures at the last Universal Mathematical Congress, at which, he said, practically the only two people who had been able really to understand one another were the pencil-seller and the picture-postcard man, and they only thanks to their knowledge of Esperanto. Mons. Farman, the well-known Esperantist aviator, who was present with his wife, promised to add to the Michelin Esperanto Schools Competition prize a special cup, together with a trip on an aeroplane. A very fluent speech in Esperanto was made

by the Mexican, a meteorologist, who had as his neighbour at table a Japanese, also a meteorologist, who in turn much interested the company recounting how, although in Japan he had thought Esperanto of not much practical use, he had nevertheless learnt it during his stay in Germany. He was now fully convinced of its great utility, and promised to help in making it better known to his countrymen on his return home. Speeches were also made by a London Esperantist, S-ro Candy, and by a Hungarian. British Esperantists who happen to be in Paris on a Thursday should make a point of visiting the Espérance Restaurant in the Avenue de la Grande Armée near the Porte Maillot—quite easily accessible—where at noon the Parisian samideanoj are in the habit of taking lunch together.—Mons. Emil Souchay, Labor-konsulo for Paris, to whom we are indebted for these notes, wishes to record his thanks to two *Esperantianoj*, Messrs. Nix, of Eastbourne, and Sumfield, of Polegate, for their kind hospitality to his daughter during her holiday in England, a holiday, by the way, which without Esperanto would have been impossible.

Roumania.—Esperantists in this country, after most pleasant excursions during the summer to Constantinople, Odessa (Russia), and Rustchuk (Bulgaria), are now addressing themselves with enthusiasm to conducting the winter Esperanto classes. On October 20 the "Dr. G. Robin Esperanto Circle" started a class in the First Grade Girls' School No. 15 in the North Station district, conducted by S-ro Miluta Simon, our special correspondent. Other courses shortly to be opened are two, under the direction of the Roumanian Esperanto Society; the main one is to be held in lecture hall of the Lycée "Matei Basarab," under the guidance of Mr. Al. Teodorescu, pres., R.E.S., and the other in "General Golescu" School. It will be seen that the educational authorities in Roumania are quite in sympathy with our movement!—In order to unite the forces working for Esperanto in Roumania, which have hitherto been too unconnected, there was founded on September 29 an "Esperantista Asocio," in which for the first time all Esperanto societies in the country are working together in a common plan.—Roumanian samideanoj recently had the pleasure of welcoming among them a number of Esperantists from Great Britain, among others our president, Mr. H. B. Mudie, and Mr. Adams, of Hastings. Another notable visitor was a Servian engineer, S-ro Dragomir Andonovici, also a Bulgarian Esperanto caravan from Rustchuk afforded fine opportunity for friendly international intercourse. Mr. Parrish, international lecturer for the Californian Chambers of Commerce, was also a welcome visitor. Mr. Parrish, readers will be interested to hear, knows no languages but English and Esperanto; yet he has lectured to big audiences in every country in Europe during the past eighteen months, and the striking evidence of the practical work of Esperanto which he has gained during his unique tour was of considerable value to our Roumanian friends.

The Saxon Government, after careful investigation as to the fitness of Esperanto for the rôle of international auxiliary language, now devotes a considerable sum of money annually to its propaganda, and has even instituted official Esperanto classes and lectures in its own special *Esperanto Institute*, Dresden. To it belongs the honour of being the first government which not only makes public recommendation of Esperanto, but supports the movement financially, in which connection Esperanto has been on more than one occasion the subject of favourable discussion in the Saxon Parliament. The Saxon Government has also recently issued an elegantly printed and richly illustrated brochure in Esperanto concerning the Royal Porcelain Manufactures at Dresden. This may be had gratis by anyone who will send to the *Saksia Esperanta Instituto, Ständehaus Cambro 83, Dresden*, an international reply-coupon to cover postage.

Por la Blinduloj.

Al Grupsekretarioj kaj Aliaj.

La Esperanto Sekcio de la Nacia Pruntedona Biblioteko por Blinduloj, Incorporated National Lending Library for the Blind, 125, Queen's-road, Bayswater, London, W.

Imagu al vi dum nur malmulte da minutoj, mi petas vin, ke vi, Estimata Leganto, estas blinda! Imagu, ke vi *nenion* povas vidi! Kio estas la sekvoj? Fermu la okulojn, kaj spertu la efekton! Vi ne povus legi nek skribi; vi ne povus marŝi trans la ĉambron ne ĵetante vin kontraŭ io, aŭ ion renversante. Tre certe vi dirus malagrablaĵojn! Vi ne povus eĉ tranĉi vian propran mangajon. Unuvorte, vi estus *dependa*, ne sendependa homo, kio ŝatas esti ĉiuj pli, ol kio ajan en la mondo.

Mi havas la honoron esti sekretario de la Esperanta Sekcio de la suprenomita Biblioteko; kaj en tiu rilato sentas min respondi laŭ mia eblo por la sukceso kaj la kreskado de nia afero. Kiam mi konsideras la Herkulesajn laborojn de multaj el miaj kunlaborantoj pri Brajloskribado kaj korektado, mi mem tre hontas pri mia malsukceso plenumi tiom, kiom ili. Tamen, ne estas mi sola, kiu povas regi eĉ nur la financon de nia Sekcio, —car ekzistas nenia financo, kiam mankas mono! Kaj tia—mi certigas vin—estas harojngriziga stato por la bedaŭrinda sekretariino.

Efektive tamen, ni havas *iom* da mono; sed la plejparto de ĝi estas speciale donita por aparta fako, kaj ĝi estas netuŝebla por generalaj elspezoj. Tial, se mi ne estus ricevinta 50 Sm. de malavara helpanto je preskaŭ la lasta tago de 1911, restus malpli ol nenio en mia Generala Kaso por komenci la novjaron. El tiu Kaso ni devas pagi por nia lokorajto ĉe la Biblioteko. Memkompreneble ni liveras librojn al la Biblioteko; tamen, tio nur pligrandigas laboron por la tiea oficistaro. La Sekretariino certigas min, ke baldaŭ necesos la ĉeestado de aparta sekretario por la Esperanto Fako! Kaj krom tio, ni devas—laŭ mia ideo—pagi iomete por la luprozo, por bindado de libroj, por la oficistaro, k.t.p.; kaj ĉio ĉi devas pagi el nia Generala Kaso.

Kompreneble, ĝis tiom, kiom ni povis, ni tion jam faris. Tamen, se la Esperanto Sekcio estas kreskonta, —se vi, niaj amikoj, deziras, ke ĝi kresku—ĝi ja povas nur kreski *laŭ via volo*, —t.e., *laŭ viaj donacoj*.

Estas tre kuraĝige, ke mi povas certigi al vi, ke la blindaj legantoj postulas eĉ pli da Esperantaj libroj ol ni ĝis nun povis liveri al ili. Tio montras, efektive, ke ekzistas reala bezono por tiaj libroj.

Tial mi petas denove—mi eĉ petegas, ke ĉiu Esperanta Grup-Sekretario metu ĉi tiun aferon antaŭ sia Prezidanto kaj sia Grupo, por ke—laŭ la interkonsento de la Blindula Kunveno ĉe la Geneva Kongreso—ĉiu Grupo helpu almenaŭ unu blindulon pri Esperanto.

Restas nur, do, ke Britaj Grupoj, kaj ankaŭ eksterlandaj Grupoj, helpu nin; —car ni celos estonte interrilatiĝi kun eksterlandaj Blindulaj Bibliotekoj. Kelkaj el la Grupoj tion jam faras; kaj ni tre konscias pri ilia bonkoreco. Sed, se el la tuta gruparo troviĝanta sur la kovrilo de la *British Esperantist*, ĉiu donus po 5 ŝilingojn ĉiujare (—kaj mi nepre petas, ke tion, kion oni komencas, oni ankaŭ daŭrigu!—) ni ricevus pli ol 350 Sm. ĉiujare. Eble kelkaj grupoj povus doni pli, kaj kelkaj malpli, ol tiu sumo—mi ne scias. Nur, se vi ŝatas nian laboron, se vi deziras kunlabori, se vi honoras la sinhelpantajn blindulojn, kiuj volas esti tiel memstaraj, kiel vi,—do, pro amo al ili, aŭ pro amo al Dio—(kaj estas same, ĉu ne?—) Helpu nin!

Bonvole notu, ke la lasta monato de la jaro jam alvenas, kaj mi atendas esperplene, tamen iom maltrankvile, ĝis mi ricevos la rikolton por subteni mian laboron en la venonta jaro. Kiu helpos? Ni tre bezonas kaj kutiman kaj novan monhelpon. Afable, do, sendu al

HILDA E. BOORD, 8, Stanley-gardens, London, W.

Council Meeting, B.E.A.

Minutes of Meeting of Council held at the Offices of the Association on Monday, 18th November, 1912, at 6.30 p.m. Present: Messrs. H. B. Mudie (chairman), H. D. Akerman, Miss D. E. Bellamy, Messrs. W. Burden, P. J. Cameron, B. Chatterton, C. E. Cowper, C. A. Fairman, J. C. Flügel, Colonel W. A. Gale, Misses L. S. Grant, E. A. Lawrence, Messrs. B. E. Long, A. Morrow, W. Phillimore, W. E. Rolston, Misses M. R. Henningsen, C. M. Holmes, Mr. A. Honeysett, Miss Ad. Schafer, Messrs. F. M. Sexton, A. Sharp. In Attendance: Messrs. W. W. Mann, A. E. Wackrill, E. A. Millidge, and the Secretary.

Hon. Solicitor.—On the proposal of the President it was decided to elect Mr. G. Mercer Hollis Hon. Solicitor in the place of the late Mr. Arthur Blott.

Advisory Committee.—It was decided to elect Mr. G. Mercer Hollis a member of this Committee.

Mid-Monthly Gazette.—Mr. Mudie reported that a meeting of the British Esperantist Committee had been held that evening, and that the following recommendations had been made:—

THE BRITISH ESPERANTIST Committee recommend to the Council that a new mid-monthly journal, consisting initially of 16 pages and costing one penny (by post 1½d.) in the United Kingdom, be issued by the B.E.A. in the middle of each month, commencing in January, 1913. That the editor be Mr. W. W. Mann at a salary to be decided.

After lengthy discussion the recommendations of the Committee were accepted, and it was decided that the title of the new gazette should be "The Esperanto Monthly." The question as to the salary of the Editor was postponed until the next meeting. The President said it was expected that the cost of 5,000 copies would be under £12 each month, and Mr. Mann gave an outline of the contents of the proposed journal, which would be a monthly instruction magazine with hints for teachers and help for students. On the suggestion of Mr. Cameron, the President promised to submit to the next meeting a statement showing the probable expenses and income of the projected gazette.

Mr. E. A. Millidge.—A letter was read from Mr. Millidge stating that the work in connection with his Esperanto-English Dictionary was now completed, and that he was able again to offer his services to the Association, but not as chief Editor of THE BRITISH ESPERANTIST. It was decided that fuller discussion of Mr. Millidge's position should be deferred to the next meeting.

The late Mr. Ernest Pointer.—The Council heard with much pleasure that the President had been promised a donation of £30 from Mrs. Pointer, which her late son had requested should be devoted by the B.E.A. to some special purpose connected with prizes for youthful students.

Lantern Slides.—A letter was read from Mr. Goodliffe regretting that he could not accept the Curatorship of the Lantern Slides, and it was decided to appoint Mr. Epstein to the office.

Lectures on Prague.—A letter was read from Prof. A. Pitlik of Prague, asking whether the Association would be willing to organise in this country the lectures on Prague and the "Sokol" he had arranged to give in France, Germany, and elsewhere. Prof. Pitlik being recommended by the Bohemian Esperanto Association, it was decided to co-operate with Prof. Pitlik in accordance with his letter.

Decease of Dr. Dor.—The Council heard with much regret of the decease of Dr. Dor, of Lyon, and directed a letter of condolence should be sent to the T.E.K.A. and the family of Dr. Dor.

The British Esperanto Association (Inc.).

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

EXTRACT FROM RULES.—“If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member.”

A. S. E. ACKERMANN, 25, Victoria-street, Westminster, S.W.; HENRY BAX, 51, Shepherd’s Bush Green, W.; Miss M. BISHOP, 40, North Street, Wellington, Som.; Miss S. BISHOP, 62, High Street, Wellington, Som.; H. HELDMANN, J.P., Worton Court, Isleworth; W. H. HUSE, 97, Mammoth-road, Manchester, N.H., U.S.A.; S. R. MARSHALL, 57, Muirkirk-road, Catford; E. C. MAWBAY, P.O. Box 1031, Johannesburg, South Africa; J. McMULLAN, Castle-street, Portadown, Ireland; J. A. MEAGHER, “Moynville,” Castle-avenue, Clontarf, Dublin; C. PRICE, c/o Messrs. Paterson, aing & Bruce, Sturt-street, Townsville, N. Queensland, Australia; Miss G. SANDERS, 60, Croydon-road, Anerley, S.E.; A. E. SCOGAL, M.A., LL.D., 1, Wester Coates Avenue, Edinburgh; B. SHAPLEIGH, Luxon Lodge, Harvel, Kent; F. H. SWEET, 76, Markham-street, Toronto, Ont., Canada; Miss M. THORPE, 22, Grove-road, Harrogate; Miss E. WILLMORE, 4, Florence-terrace, Falmouth; Miss G. WORTHINGTON, Hillesdon, Leek, Staffs; Miss M. E. NICHOLSON, Briardale Cottage, Letchworth, Herts.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

C. E. BARNES, Brackley; M. A. BROWNE, Perth, W. Australia; *T. J. RICHARDS, Eastbourne.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

Miss E. L. HAMMOND, Sialkot, Punjab, India; *E. W. STEPHENSON, Kendal; DAVID TILLY, Whangarei, New Zealand.

* Denotes that the candidate has passed with distinction.

Guarantors, 1912.

Amount acknowledged in September B.E. £5,190 0 0
 Cowper, C. E., Deal ... 10 0 0
 Lanyon, H. M., Gisborne, Australia ... 10 0 0

Total ... £5,210 0 0

Donations.

June—November.

Propaganda Kaso 1 0 0
F-ino S. E. Harding	0 5 0
Mrs. Pennington, London	0 17 8
W. Lee Church, Boston, U.S.A.	0 4 9
G. D. Buchanan, Glasgow	1 1 0
G. Mercer Hollis, London	2 2 0
Montrose Esperanto Society	1 0 0

Christmas Holidays.—By decision of the Council the offices of the Association will be closed from Tuesday evening, 24th December, to Monday morning, 30th December.

Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni empresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses penceojn (25 spesdekojn) por trilinia empresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri penceoj por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu empresajon senpage. Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.

205. S. Petersburg (Rusujo).—S-ro A. Kind, B. Pouchcurscaya N. 50—2kv. 3, deziras interŝangi p. markojn kun ĉiuj landoj, kaj p. kartojn kun ne-eŭropaj.

209. South Whitley (Indiana), U.S.A.—S-ro John F. Kendrick, kolektas fotografaĵetojn sur p.k. de gesamideanoj de tutmondo. Bonvole sendu al mi vian; mi nepre kaj tuj reciprokos.

210. Katalogoj Komercaj.—Sinjoro Heriberto Diaz Lopez dezirante ricevi esperantajn katalogojn, por esperanta eksposicio, petas al ĉiuj firmoj el la mondo sendu al li siajn prezarojn esperante: *Strato X. No. 5, Sia Cruz de Tenerife, Kanariaj Insuloj.*

211. Auxerre (Yonne), Francujo.—S-ro André Vincent, 22 rue Gérot, deziras korespondi kun geamikoj sportistoj alilandaj per letero kaj poštarktoj.

212. Avignon (Francujo).—S-ro Marcel Vallier, Boulevard des Villas 41, interŝangas p.m. kaj korespondas per p.k. kun ĉiulanduloj, skribu baldati (mi parolas iom la anglan lingvon).

213. Moskvo (Rusujo).—S-ro A. Prager, Postaketo, p.k. ilustr. kun Amerikanoj. Petas represi. (97)

214. Praha VII. (Bohemujo), Aŭstrio.—S-ro T. Krupička, u Akademie 230, deziras interŝangi poštarktojn kun ĉiuj landoj. (97)

B.E.A. Competitions.

(The Special Funds initiated by the President in his Address to the Members at the Annual General Meeting, 27th May, 1912. See “British Esperantist,” July, 1912, p. 130).

A prize of £2 2s. is offered for the best original essay upon the subject:—“La grava signifo de l’ Nova Testamento en Esperanto.”

The following conditions are to be observed:—

(1). An entrance fee of one shilling must accompany each essay.

(2). A *nom de plume* must be used by each competitor, and his name must not appear on the papers. It must be notified with the address on a separate sheet.

(3). Essays must be in Esperanto, and should, if possible, be typewritten.

(4). The length must not be less than 1,600 words nor exceed 3,200 words.

(5). The winning essay to become the property of the B.E.A.

(6). Unsuccessful essays will be returned if accompanied by stamps for postage.

(7). If new words are used, the English translation should be given in a footnote.

(8). Essays must be written on one side only of the paper, and must reach the offices of the Association not later than 31st March, 1913.

Nomination of Councillors, 1913-14.

The Members and Fellows of the Association are reminded that they have the right to nominate candidates for election as Officers and Council for the ensuing year.

Members and Fellows who desire to avail themselves of this privilege may obtain Forms of Nomination with the necessary Instructions from the Secretary of the Association.

The latest date for the receipt of nominations is 20th January, 1913.

H. CLEGG, Secretary.

Council Meetings.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council of the B.E.A. will be held on Monday, December 18th, at the Offices of the Association, 133, High Holborn, London, W.C., at 6.30 p.m.

H. CLEGG, Secretary.

215. Moskvo (Rusujo).—S-ro J. J. Orlov, Studento, *Poste restante*, dez. koresp. per il. p.k. kaj let. angle aŭ Esperante kun inteligentaj ge-esp. el Anglujo kaj Britaj Kolonioj (tre volonte el Nova Zelando) pri la literaturo, laboroj movadoj kaj legoj, k.t.p. Ciam resp.

216. Bitterfeld (apud Leipzig), Germanujo.—S-ro Wilhelm Jahn, Steinstrasse 4, deziras interŝangi il. p.k. kun ĉiuj landuloj. Ciam respondos.

217. Dunston-on-Tyne (Anglujo).—S-ro Thos. A. Meredith, 8, Ravensworth-terrace, komencanto, deziras korespondi kun pli progresintaj alilandanoj.

218. Kazan (Rusujo).—S-ro Vadim Buškov, studento-juristo, *Nomera “Volga,”* korespondas per p.k. ilustr. Ciam respondas.

219. Kazan (Rusujo).—S-ro F. Batuev, studento-juristo, *Universitato*, korespondas per p.k. ilustr. kaj letero. Ciam respondas.

220. Devoran (Cornwall), Anglujo.—F-ino Edna Mitchell (mia havas nur dek jarojn), St. John’s-terrace, deziras interŝangi poštarktojn ilustritajn kun junaj Esperantistinoj el kiu ajan loko de la mondo.

221. Buenos Ayres.—La Grupo Casul Catalá, Tacuari, 1472, intencas organizi ilustritan poštarkton eksposicion dum la venonta Januaro, kaj petas ke la legantoj bonvolu skribi al ĝi per ilustr. p.k. Ciam respondos al ĉiuj poštarktoj.